# TEA-BULTENO

20A JARO - N° 138 | JULIO - AŬGUSTO | N. 7-8/2017


La Sep Sociaj Pekoj: politiko sen principoj, riĉeco sen laboro, plezuro sen konscienco, scio sen karaktero, komerco sen moralo, scienco sen homeco kaj kredo sen sinofero.
*Gandhi Mohandas Karamchad (1869-1948)*

## Karaj Gelegantoj!

Somero jam ekkaresis nin per sia arda, eĉ ardega, mano kaj tio ĉi invitas min - kaj tutcerte ankaŭ vin ĉiujn! - flankenmeti ĉiajn devojn, taskojn, laborojn por feriadi en pli freŝaj lokoj, por liberigi la menson de ĉiutagaj rutinoj, por plonĝi en la malvarmetajn marajn akvojn, por ĝui la naturon *(almenaŭ tion kio restas post la plurjarcentaj damaĝoj kaj detruoj far la homaro!)* kaj por admiri la arton kaj konatiĝi kun la kulturo de la aliaj landoj de nia planedo.

Ĉi-jare feliĉuloj vizitos la mirindan azian landon Sud-Koreio, pro la UK okazonta en Seulo, sed ne nur tiu okazaĵo meritas nian atenton: ĉie kaj ĉie oni organizas/os ion ĉeestindan, nur sufiĉas havi tempon por trafoliumi retajn paĝarojn, serĉante la plej entuziasmigan allogaĵon. "Kie kaj Kiam" ne gravas: gravas ke oni havu valizon, eĉ pli bone dorsosakon, en kiun meti identigilon, notlibreton, skribilon, gvidlibron, mapon, jarlibron kaj monujon, *(nu, eĉ mono ne gravas, preferindas lasi ĝin hejme por ne riski ĝian perdon. Pli bonas kreditkarto!)*: se vi jam posedas ĉion ĉi, la mondo estos via!

Bonan amuziĝadon kaj sukcesoplenan someron riĉan je E-eventoj! Nepre ne forgesu la Tea-Bultenon hejme: dum atendado en fervojaj stacidomoj, en flughavenoj, en aŭtoŝoseoj, ĝi utilos al vi, bone pasigi la tempon.

Kore, la redaktanto

## Tra la verda mondo!

Mi deziris prezenti al vi tutan panoramon de la aranĝoj okazontaj en plej diversaj partoj de la mondo, sed ne eblas tion fari: estas tiom da proponoj, ĉiuj tre interesaj, en ĉiu parto de la mondo, ke vi devas kontentiĝi je la plej altiraj (laŭ mia opinio, kompreneble!) kaj se tiu ĉi aro da okazaĵoj ne sufiĉe vin kontentigos, iru al la paĝaro de "Eventoj" www.eventoj.hu/2017.htm kaj... feliĉan elekton!

**9 - 22. julio** - Somera Esperanto-Perfektigo, Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Ĉiutage: 6 instruhoroj (de lundo ĝis sabato), posttagmeze: vizitoj, gvidadoj, ekskursoj, naĝado, bicikl-ado, promenado, festoj, ktp. Vespere: Filmoj, muziko, ludoj, interparoloj, literaturo, ekskursoj. esperanto-zentrum@web.de

**14 - 16. julio** - 5ª SOREN - Somera Renkontiĝo, Sapa, Vjetnamio. Organizas ĝin VEJO (Vjetnama Esperantista Junulara Organizo). Lokaj esperantistoj atendas vin por prezenti al vi la Landon.

**15 - 23. julio** - Somera Esperanto-Studado, SES - Internacia renkontiĝo de interretaj E-lernantoj kaj aliaj komencantoj en Banska Štiavnica, Slovakio. Antaŭtagmeze lernado; posttagmeze ekskursoj, prelegoj, ludoj; vespere koncertoj, filmoj, amuzado. Samtempe kaj samloke okazos IEK-2017 de OSIEK. Informas: Peter Balaz, rete: petro@ikso.net

**19 - 29. julio** - Piedmarŝo Milan Zvara, en Karpata montaro, Ukrainio. Esperanto-piedmarŝo de la vilaĝo Dovhe, (kie naskiĝis la fama slovaka esperantisto Milan Zvara) al la plej alta monto de Ukrainio. Inf.: Volodimir Hordijenko volodimir@ukr.net

**29. julio - 6. aŭgusto** - Haltejo Woodstock, en Kostrzyn ĉe la rivero Oder/Odra, Pollando, je 5 km de la german-pola landlimo kaj je 95 km de Berlin. Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo Przystanek Woodstock (500.000 homoj). Informoj de andim@gmx.li

**16 - 23. aŭgusto** - Junularo Renkontiĝo en Kreto, urbo Neapoli, la Esperanto-Domo de Annie Grente. Kiom kostos? 5 € tage por manĝoj. Ŝi povas gastigi 10 homojn. Kontaktu ŝin: anniegrente@hotmail.fr

### 26 aŭgusto-2 septembro

### Ĉiuj al Heraclea, apud Matera, en la suda Italio, por la 84ª Itala Kongreso

Dum la plej internacia nacia kongreso, estos traktata la jena temo:

### Kulturo kaj Komunikado en Eŭropo

Elstaraj estos la prelegantoj, nur kelkajn mi citos: Osmo Buller, Lu Wunsch-Rolshoven, Fabrizio Pennacchietti, Emanuele Regano...

Eminentaj la diversgradaj kursoj, kun Anna Löwenstein, Nina Pietuchovska...

Entuziasmigaj la koncertoj.

Eksterordinare interesaj la ekskursoj tra la Bazilikata regiono...

Kaj ni ne parolu pri la gastronomio! Ja tio ĉi sufiĉus por konvinki la plej skeptikajn aŭ nedecidemajn! Estas ankoraŭ tempo por aliĝi, sed hastu, hastu, por ne riski dormi sub la pontoj!

# Projekto "Koni Trieston"

Ekzistas strato en Triesto, nomata *Sara Davis*. Ĝi troviĝas en la kvartalo *Roiano*, mallonga kaj sufiĉe dekliva. Konata per tiu angla nomo ĝi estas ekde 1905. Dum la 2ª mondmilito, tamen okazis ŝanĝo pro volo de la faŝista reĝimo kiu preferis ĝin dediĉi al la tiama eritrea urbo *Cassala* [Kassàla]. Nur en 1946 ĝi rericevis la originan nomon.

Sed kiu estis tiu Sara Davis? Filino de londona komercisto, kiu posedis la bonstategan firmon *Davis & Co.*, eksportantan industriajn defalaĵojn, je sia morto ŝi heredigis al la urbo imponan havaĵon, kies valoro egalis al pli ol unu miliono kaj duono da kronoj. Dum sia vivo, tute anonime, ŝi malfermis sian vilaon al mizeraj familioj, kiujn ŝi monhelpadis kaj al kiuj klopodis precipe doni moralan subtenon, per interesiĝo pri iliaj vivkondiĉoj. Tiu grandanima angla sinjorino testamentis favore al la triesta komunumo sian rezidejon, asignitan al realigo de infana feriejo, kaj monsumon por la konstruo de Kovrita Bazaro, en la centra strato *Carducci* [Karduĉi]. Ŝi mortis en 1904, sen neniu dankatesto fare de la urbo pro sia bonfara agado.



Eble iu sin demandos: kial ŝi deziris starigi legom-bazaron? Sara Davis evidente havis veran amemon al la malriĉuloj, kun kiuj ŝi estis tre malavara, sed ankaŭ al personoj kies vivtenado estis aparte peza pro lokaj cirkonstancoj. Vizitante la subĉielajn bazarojn, ŝi rimarkis, kiom malfacila estis la laborado de la *venderigole* [en la triesta dialekto], la triestaj legomvendistinoj. Ili vendis siajn varojn, bele eksponataj sur lignaj benketoj, sen ŝirmiloj kontraŭ suno aŭ kontraŭ *bora* [triesta forta vento] en placo *Goldoni*. Pro tio ŝi decidis helpi al ili, konstruigante komfortan halon, ekipitan per apartaj novaj strukturoj.

La Komunumo plenumis sian promeson kaj per la postlasita mono estis starigita la ankoraŭ nun ekzistanta bazaro, laŭ la projekto de arkitekto Camillo Iona.

Inaŭgurita en 1936, ankoraŭ hodiaŭ ĝi estas pleje moderna kaj konforma al la bezonoj, karakterizata per tre vastaj, lumenlasaj vitraj fenestregoj. La domo okupas triangulan areon kaj havas ungoforman planon. La du etaĝoj estas okupataj de grandaj salonoj.

La taŭgeco, evidenta en la interno de la bazara, unuaetaĝa salono, okulfrapas pro la helicforma ramplo inter la unua kaj dua etaĝoj, kiu servis por la trafikado de la ĉaroj provizantaj la varojn. Klaras, ke architekto Iona inspiriĝis el la famaj deklivvojoj elpensitaj de Jacopo Barozzi el Vignola[1)] [Jàkopo Barocci; Vinjola] aŭ "reinventitaj" de Giacomo Mattè Trucco[2)] [Trukko] , videblaj en la torina konstruaĵo FIAT LINGOTTO (1926). Tiu ĉi ideo estis tuj kaptita de aliaj projektistoj por la pluretaĝaj parkadejoj en Eŭropo kaj Usono.

La kaŭzo de tiu elekto fare de la arkitekto estis, ke la ramplo enestis en angula tureto, kaj sekve li devis solvi la problemon de la ankuta angulo, formiĝanta pro la renkontiĝo de la du vojoj situantaj laŭ la longaj lateroj de la konstruaĵo.

La "laŭlongaj" aŭ "bendaj"[3)] fenestroj sekvas la liniojn de la tureto ĝis atingis la kulminon, distingita per luma horloĝo.

La Kovrita Bazaro estas la prototipo de komercaj centroj. En ĝi la komercaj aktivaĵoj lokiĝas en la du etaĝoj. Teretaĝe aĉeteblas nutraĵoj, kiaj fruktoj kaj legomoj, viando kaj fiŝoj, pano kaj fromaĝoj; unuaetaĝe vestaroj, modaj akcesoraĵoj kaj ŝuoj.

En mia knabinaĝo mi tre ŝatis viziti tiun preskaŭ ĉiovendejon, pro la koloroj, pro la bele ekspoziciitaj vegetaĵoj, pro la bonodoroj de pano kaj fromaĝo kaj ankaŭ, por senbremse kuradi laŭ la kapturnigaj ramploj.

Okaze de la 80-jariĝo de la bazaro, estis farita granda festo oktobre pasintjare, ĉeeste de la urbestro kaj aliaj komunumaj skabenoj, dum kiu estis malkovrita ŝildo memore de la bonfarantino Sara Davis, al kiu la triestaj *venderigole* estos ĉiam dankaj.

**Notoj**:

1) Jàkopo Barocci, dirita Vinjola: naskita en Vinjola, 1507, kaj mortinta en Romo, 1573, estis arkitekto kaj teoriulo pri arkitekturo. Li estis unu el la eminentuloj de la modernisma skolo. Konstruis por gravaj familioj, inter kiuj la familio Farnese [Farneze], kaj papoj. Li ripozas en la roma Panteono.




Je paĝo 4a

# *Laste trovitaj!*

Ĉi-foje, por diri la veron, nenion mi trovis, ĉar tutsimple mi ŝtelis de James Rezende Piton[1]., el Brazilo, kompetenta filatelisto kaj E-historiisto, tre interesan foton kiu havas rilaton kun fama esperantisto. James, kiu kelkajn fojojn vizitis nin en Triesto kaj eĉ prezentis parton de sia impona E-poŝtkarta kolekto, skolte esploras ĉiajn eblajn padojn por malkovri aŭtentikajn perlojn. Unu el tiuj estas ĝuste la ĉi-sube videbla karto.




La foto estis farita en Céret, je kelkaj kilometroj de Perpignan, Francio, kaj ĝi reklamas la magazenon "Ĉe la du Leonoj". La vendejo proponas diversajn varojn, tre malsamajn inter si: de horloĝoj kaj strasa juvelaro al bicikloj kaj kudromaŝinoj. Kompreneble, kio tuj altiras nian atenton, estas la grandlitera skribaĵo sur la tolmarkezo: ESPERANTO! Sed ne nur pro tio la karto valoras: la ĉefa kialo estas, ke ĝi koncernas la esperantiston Paul Berthelot.




El reklamo aperinta en la unua numero de "Esperanto" eblas ekscii, ke li estis la "Gérant" de tiu vendejo, nome la aferkondukanto, kaj ke tie oni parolis la katalunan kaj francan, kaj korespondis Esperante (ĉ. en la jaro 1903). Nu, tiam P. Berthelot aĝis ĉ. 23 jarojn (n. 1882[2]., Auxerre). Li estis eksteredzeca filo de eminenta franco, Paul Bert, medicinisto, fiziologia profesoro, membro de la Franca Scienca Akademio.

En 1900 li aliris Esperanton kun granda fervoro kaj ĝin komencis propagandadi. Jam en 1903 kun Charles Lambert (esp-isto ekde 1899) li verkis "Komercaj Leteroj"-n, libron por helpi komercistojn kaj studentojn de komercaj lernejoj korekte fakkorespondadi. Verve inteligenta kaj genie fantazia, li tamen estis iom kaprice sendisciplina: en lernado li aplikis sian talenton nur al studobjektoj lin allogantaj. Post la liceo, li ekstudis medicinon en Parizo, sed pro rifuzo militservi de tie foriris (*ndr*: laŭ Carlo Bourlet, pro malsaniĝo je tuberkulozo - "La Revuo"- 1910-11, pĝ 375).

De 1900, diversaj ideologioj kaj filozofioj forte ekaltiris lin: spiritismo, determinismo, socialismo kaj fine anarkiismo. Flame kaj idealiste li ĉiam defendis siajn opiniojn: "La esprimo sincera de miaj ideoj estas al mi pli kara ol ia ajn konsidero". Entuziasma disĉiplo li estis de Francisco Ferrer, fama anarkiisto, ekzekutita en 1909.

En 1903 li eldonis "Vortaro Franca-Esperanta"-n kun Th. Cart kaj Merckens; en 1904 "Provo de ĥemia nomigado en E"-n kaj samjare "Fonetika litera skizo pri kelkaj konsonantoj"-n, sub la pseŭdonimo *Marcelo Verema*.

En 1904, Berthelot kunigis katalunajn esperantistojn ambaŭflanke de la Pireneoj kaj fondis la Grupon Esperantistan de Katalunio, kiu estis la unua kataluna esperantista asocio. Lia plej grava faro, almenaŭ por ni esperantistoj, estis la fondo de la UEA-organo, "Esperanto". La 18$^{an}$ de junio 1905 aperis ĝia unua numero. Ĉi-sube partoj de lia enkonduko:



"Al Leganto

«Ankoraŭ unu gazeto esperantista! - vi certe ekkriis vidante tiun ĵurnalon - ĉu ne estas jam sufiĉe, eble jam tro, ĉar kelkaj nur kun peno vivadas! Kial tiu nova organo?»

Al tiu demando ni volas respondi.

Vera esperantisto estas esence propagandisto.[...] Sed antaŭ ol alveni al tiu stato, kie la penso estas kiel formiko trenanta grenegon malgraŭ obstakloj kaj laciĝo kun la fiksa ideo de l' devo plenumota, antaŭ tio la estonta esperantisto ĉirkaŭflaras, ekprenas, delasas, foriras, revenas laŭ la eksteraj cirkonstancoj, kiuj lin altiras aŭ forlogas. [...]

Tial estas bonega kaj laŭdinda la entrepreno de tiuj komercistoj kiuj donas al siaj fabrikaĵoj la nomon *Esperanto*: plumoj Esperanto, bicikletoj Esperanto, ĉampanvino Esperanto, k.t.c. tiel ke almenaŭ la *Vorto* ĉirkaŭvolvu la tutan vivon kaj sentigu la enradikiĝon porĉiaman de nia afero en la homa civilazacio. [...] Tial oni kreis gazetojn kaj broŝurojn.

Niaj gazetoj ĝisnunaj estas monataj revuoj pli malpli artaj, literaturaj kaj... kostaj. Preter tio ke ili nur malmulte interesas la publikon *ekster*-esperantistaran, ilia prezo malpermesas ilin disdoni, dissemi, laŭ la parolo de l' poeto:

Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
Ni semas, kaj semas konstante.

Jes, almenaŭ se la semo ne kostas tro kare po hektolitro! La rolo de niaj revuoj ne estas tia. Ili utilas tre bone por kunligi la membrojn de siaj fermataj *eklezioj*, por perfektigi ilian konon de la lingvo kaj ankaŭ por permesi interŝanĝon de malagrablaĵoj pli malpli dolĉaj inter si. [...]

Broŝuroj multe pli taŭgas [...]. Sed la tempo de broŝuroj jam pasis. Ili ne estas nun sufiĉaj kaj baldaŭ ni devos militi kontraŭ la malbonvolo, la ofenditaj interesoj, la eternaj antaŭjuĝoj kiuj fariĝos des pli atakemaj ke ni estos pli fortaj kaj danĝeraj por ili. [...]

Oni ja vidis tion en la raporto tiel malbonintenca de S° Rozet antaŭ la franca ĉambraro, raporto kiun presis la *Journal Officiel* kaj represis ĉiuj gazetoj malamikaj al nia afero. Al tio ni respondis kiel en niaj privataj gazetoj, parolante al *ni mem*, kaj lasante la malbonan impreson tutan por la ekstera publiko.

Estas neeble ke tia stato daŭru. Ni devas malfermi la fenestrojn kaj alparoli la grandan publikon, interesi la indiferentulojn, decidigi la ŝanceliĝantojn.


Por tio bezonas ĵurnalo grandformata, multekzemplera, en lingvo komuna, disvendata, dispruntata, disdonata al ĉiuj, disputanta la hodiaŭan kontraŭdiron, senĉese informantan ĉiun klerulon, ĉiun kiu scias legi pri la vivo kaj vivemeco de l' entrepreno esperantista.

Tial ni fondis tiun ĵurnalon [...]. Necesas ke nia gazeto estu ĉie, en vendejoj, legejoj, kunvenejoj, [...] sur la ŝipo, en la stacidomo de la fervojo, en la kafejo, sur la strataj kioskoj, en la manoj de l' promenantoj. [...]

La batalo komencas, ŝpari kartoĉojn estus malakcepti la venkon! ANTAŬEN!"

Jen liaj ideoj, jen lia fervoremo, jen lia entuziasmo, subtenataj de lia firma kredo pri la valoro de Esperanto, eldiritaj en tiu grava tago de la enmondiĝo de la plej fama E-revuo en Esperantujo.

Komence de 1906 P. Berthelot iris al Ĝenevo, okaze de la laboroj por la 2ª UK kaj tie eldonis "rondirantan folieton por kreado de tutmonda Socia Revuo". Tri el kvar numeroj li redaktis kaj tiu folieto iĝis en 1907 la "Internacia Socia Revuo", la unua klasbatala E-revuo. Dum la UK li eĉ aranĝis la unuan kunvenon de "verdruĝuloj".


INTERNACIA SOCIA REVUO

Monata esperanta revuo internacie redaktata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon.

Jarabono: 6 fr.; trimonate: 1 fr. 75; po numere: 0 fr. 60.

Administracio kaj redakcio: **45, rue de Saintonge, Paris-3ᵉ** (Franclando).

Tiu ĉi revuo estas la organo de ĉiuj homoj vere liberaj, kiuj bataladas kontraŭ ĉiuj dogmoj kaj celadas al la plena liberigo de la individuo.

Liberpensuloj, socialistoj, anarkiistoj, **abonu, varbu abonantojn.**

Ĉion kio rilatas al la revuo oni sendu al **R. Louis.** administranto.



Esperanto, venkinto de la konfuzo de la lingvoj, estos la Babel'a Turo, kiu kondukos nin ĝis la ĉiopova monstro.

Post la kongreso li foriris al Brazilo, kie li klopodis starigi diversnacian komunisman komunumon. Bedaŭrinde la iniciato fiaskis, kaj persekutata, perfidita, priŝtelita, grave malsana pro ftizo, li rifuĝis en katolikan mision de francaj dominikanoj, en la brazila ĝangalo. Li estis ateisto sed, ĉe la monaĥoj, li reakiris la perditan kredon. Kortuŝa estas ĉi tiu lia esprimo: "Ĉion de la vivo mi trinkis, englutis kaj vomis. Nun, nur nutras min la riĉenhava lakto de la katolika doktrino."

Ankaŭ tie, malgraŭ siaj gravaj psikaj kaj fizikaj problemoj, li sindediĉadis al Esperanto, kompilante kun dominikanoj la unuan gramatikon en la latina lingvo "Compendium gramaticae Esperanti", kiu tamen neniam aperis.

Siajn lastajn monatojn li pasigis piece, ĝis kiam je la 2ª de novembro 1910 P. Berthelot mortis en la misio de Conceição do Araguaia, en Parao-Ŝtato de Brazilo.

En sia artikolo aperinta en "La Revuo", (Volumo 5, sept 1910-aŭg 1911, paĝoj de 374 ĝis 377), Carlo Bourlet tre bele priskribas la fortan personecon de tiu ĉi multkvalita esperantisto, kiu, je la frua aĝo de 28 jaroj, forlasis ĉi mondon!

Pluraj meritaj kaj memorindaj personoj agadis en Esperantujo, plejparton el kiuj hodiaŭ neniu plu memoras, aŭ, eĉ pli malbone, tute ne scias pri iliaj ekzisto kaj la gravaj kontribuoj donitaj al la progreso de nia lingvo. Etskale kaj tre koncize mi klopodas, ke sur ilin ne falu dense nigra vualo kaj ke kion vi legis, estu instigo al plua profundiĝo pri ilia historio. **E.D.**

De paĝo 2a

**2)** Jakobo Mattè Trukko (1869-1934), itala inĝeniero, projektis multnombrajn industriajn konstruaĵojn.

**3)** Laŭlongaj aŭ bendaj fenestroj (france: *fenêtre en longueur* aŭ *fenêtre bandeau*) estis noviga verko de la elstara arkitekto Le Corbusier, pseŭdonimo de Charles-Edouard Jeanneret-Gris, kiu estis avangarda urbanizisto, pentristo, dezajnisto. Li naskiĝis en La-Chaux-de-Fonds, Svislando, oktobre 1887, kaj mortis en Roccabruna [Rokkabruna], nordokcidenta Italio, aŭguste 1967. Tiu fenestroj estis grava novaĵo uzebla kun armita betono. La fasado povas esti provizita en sia tuta longo nur per fenestr-(ar)o, kio permesas eksterordinaran lumigadon de la internoj kaj pli rektan kontakton kun la ekstero.

**Notoj**:

1. James Rezende Piton, esperantisto ekde 1988, tiam 18-jara, intense agadis por Esperanto en sia naskiĝurbo Campinas. Estrarano de TEJO de 1995 ĝis 1997, poste komisiito pri Latinameriko (1995-97), komitatano A por Brazilo (2000-10) kaj ĉefdelegito de UEA por Brazilo, li ofte prelegis en naciaj renkontiĝoj. Liaj kulturaj agadoj ĉefe rilatas al E-filatelo kaj plurfoje li partoprenis per siaj kolektoj pri la lingva problemo kaj Esperanto en brazilaj, portugalaj kaj internaciaj ekspozicioj, ricevante multajn unuajn premiojn. Alia lia amata

Sekvapaĝe

## LA MAGAZINO MONATO AŬKCIAS 25 ORAJN STELOJN!

"Stelo" estis en la 1960$^{aj}$ jaroj oficiala internacia Esperanto-mono kaj pagilo

*(vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Stelo_(monunuo) )*

La ora monero de 25 steloj estas tre valora kolektindaĵo, ne nur inter esperantistoj, sed ankaŭ inter numismatoj en la tuta mondo. Ĝi pesas 50 gramojn kaj konsistas el 98,3 % da pura oro kaj do nur la oro jam valoras 1800 eŭrojn. De ĝi estis faritaj nur 10 numeritaj ekzempleroj. Ne estas konate, kiom da ili restas en la mondo, sed **MONATO** sukcesis akiri unu el tiuj dek ekzempleroj, en la originala kesteto, la moneron kun serinumero 7.

**MONATO** aŭkcias tiun oran moneron inter siaj legantoj. Se vi deziras aĉeti ĝin, sciigu al ora_stelo@monato.net, kiun sumon vi pretas pagi por ĝi. La minimuma sumo estas 2520 eŭroj. Se via propono estas la plej alta, vi estos la feliĉa posedanto de tiu unikaĵo! La plej alta sumo ĝis nun proponita estas **2510 eŭroj.**

La gajno de la aŭkcio estos uzata por la ordigo de nova Esperanto-domo en Antverpeno, kie MONATO estas administrata.

La aŭkcio daŭros **ĝis la 1$^{a}$ de septembro 2017** je la 12$^{a}$ horo laŭ mezeŭropa tempo. Se la gajninto de la aŭkcio ne estos paginta la proponitan sumon antaŭ la 1$^{a}$ de oktobro 2017, la monero estos proponita al la persono, kiu faris la due plej altan proponon. Nur proponoj de personoj, kiuj klare montras sian nomon kaj adreson estos konsiderataj.

www.monato.net/ora_stelo.php





*Fonto: Ret-Info / Lingvo-Studio, LS*
*http://www.eventoj.hu*

## *Tie kaj tie pluketante...*

Post la malapero de la renoma revuo "El Popola Ĉinio" en 2001, ĉi-jare ree aperis Esperanta, kolora papera gazeto en Ĉinio, kun la nomo **"Tra la mondo"**. Ĝi estas fondita de Trezoro Huang Yinbao, direktoro de E-Centro Ora Ponto. Formato de la revuo estas A4, aperas trimonate kaj ĝiaj temoj rilatas al Esperantaj kaj kulturaj aferoj en Ĉinio.

La unua numero estis publikigita en januaro, kaj jam aperis la 2$^{a}$ numero.

La reta versio de la revuo estas **SENPAGE** elŝutebla el la retejo

http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de

kiel rezulto de kunlaboro kun Interkultura Centro Herzberg (ICH) en Germanio.

Pri abonoj de la papera versio oni povas kontakti la eldoninton Trezoro Huang Yinbao ĉe trezoro@qq.com.

*(Fonto: Lingvo-Studio, L.S. www.eventoj.hu)*

de paĝo 4a

ĉevaleto estas la skoltismo, pri kiu li jam posedas riĉan kolekton, ne nur esperanto-rilatan. Liaj du gefiloj estas E-denaskuloj (eĉ lia papago!).

2. En EdE la naskodato estas 1882; laŭ Carlo Bourlet, same; en Vikipedio, franca, kataluna kaj esperanta versioj, 1881. Kolofono de "Esperanto" de UEA, 1881.

(Fontoj: EdE; La Revuo; Vikipedio; Biblioteko Ramon Molera Pedrals; "Esperanto" 1975)

### Esperanto ĉe Alirprogramoj de RadioUno je la h. 14.50

Ne forgesu ŝalti la radion por aŭskulti la dissendon de



**merkredo la 9$^{a}$ de aŭgusto:**
**9 MINUTOJ KUN...**
**merkredo la 6$^{a}$ de septembro:**
**ESPERANTISTOJ EN SUD-KOREIO**

Bonan aŭskultadon!


### Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos **vendredon la 8$^{an}$ de septembro je la 19$^{a}$ h.**

Ni atendas vin multnombraj, pretaj ekagadi por la prospero de nia TEA.
Jam estas en preparo kelkaj projektoj: ni bezonas vian helpon, sed intertempe...
❁☺❁
Bonan someran tempon kaj ĝis septembro!
❁☺❁☺❁☺❁☺❁☺❁☺

### TRADICIA SOMERA FESTO ĉe ANITA

Ankoraŭ ne fiksita estas la dato, sed certas la monato: **aŭgusto**, tial, kiel eble plej frue, ni informos vin, rete aŭ telefone, pri la tago kaj horaro!



Ju pli koruptita estas la ŝtato, des pli multnombraj estas la leĝoj.

*Tacito (P. Cornelius Tacitus)*

# E-Filatelistoj dankas!

En la 2017$^{a}$ jaro kontentiga rikolto jam stokiĝas en la grenejo de **ELF-AREK** - Esperanto-Ligo Filatelista - Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj!

Venis informo pri vere bela tutaĵo, eldonita la







La 10.000 ekzemplerojn ornamas la portreto de Ludoviko Zamenhof kaj, maldekstre, la kovrilo de la gramatiko de Esperanto por poloj. Tiuokaze estis eldonita en Bjalistoko kaj Słupsk stampo kun la surskribaĵo "Ludwik Zamenhof kreinto de la lingvo esperanto".




En Francio, oni mendis individuan poŝtmarkon (ipm) por la 69$^{a}$ IFEF-kongreso de Colmar. Sur ĝi rapidega trajno, belulino, katedralo kaj cikoniino.





Por la 65$^{a}$ kongreso de Esperantistoj en Kansajo, Toyonaka, 3-4 junio 2017, ĉiuj korespondaĵoj estis afrankitaj per 82-ena ipm. Ĉarma krokodilo surestas, kies signifo ne konatas.

Koreoj estas preparantaj nekredeblan kvanton da memoraĵoj. Jam pretaj estas pli ol 5.000 ipm, distribuitaj en 352 folietojn, el po 6, 14 kaj 20 ipm. Tiuj ĉi aperis la 8$^{an}$ de aprilo. Sed la surprizoj ne tiel finiĝas: ĉiuj elsendotaĵoj ricevos porokazan stampon kaj, por la feliĉigo de numismatoj, estas en preparo 300 medaloj: pri ili nenio scieblas! Tamen atentu dumkongrese: tre frumatene enviciĝu antaŭ la koncerna giĉeto, se vi deziras akiri almenaŭ unu medalon! Multaj certe estos la "konkurantoj".




## Dimanĉon la 10$^{an}$ de septembro 2017
## Festo de Amikeco sur Monto Forno




Sur la Trilanda Pinto, *Dreiländereck*, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistoj de Aŭstrio, Slovenio kaj Italio.

Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso. Rendevuo ĉe la surpinta simbolo ekde la 12$^{a}$ horo. Tie bonvenigos nin ĉiujn Martin Stuppnig!

# Esperantisto, Ekesto kaj Malapero

Gazetartikolo
Aŭ varba parolo.
Favora impreso,
Ekintereso.
Lernolibro,
Sankta vibro,
Propaganda miasmo:
Entuziasmo!
Samideano,
(Je via sano!)
Kamarado,
Varbado,
Instruo,
En butontruo
Verda flago,
Glora tago!

Plua ŝtupo,
Nova grupo,
Nova sento,
Facila vento
Kaj poemo
Pri sama temo!

Post hezito
Delegito.
Laŭ bezono
Gazetabono,
Kotizoj
Kaj valizoj
Por kongreso.
Miraklimpreso!
Fraka vesto,
Bala festo,
Naci-kostumo,
Amindumo.
Hispanino,
Korinklino
Kaj esperoj.
Amleteroj.
Mielo,
Ĉielo!
. . . . . . .
. . . . . . .
Edzino:
FINO!

KIU KONAS LA AŬTORON DE TIU ĈI POEZIAĴO? Se mi ricevos antaŭ la 31$^{a}$ de aŭgusto la korektan respondon, kun akompano de eta priskribo de la poeto, estos lotumita interesa libro. Vi ne devos tro cerbumi, ĉar tro facilas la respondo. Do mi atendas amason da!


**BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**
**Redaktanto**: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
**Sidejo/Poŝta adreso**: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
**Kunventagoj:** ĵaŭde 17-19; vendrede 19-21
**Tel**: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
**Banka Konto**: Unicredit—IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
**Reto**: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
**Asociaj ttt-ejoj:** www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org